EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 64> ● AMO 95 ● Virtuala scienco● Marmotoj < novembro 14**

# AMO 95 pri vortara farado

Jen la ligilo por ZOOM-kunveno:
https://us02web.zoom.us/j/83237951175?pwd=NjhDejA2dDhhbEkxM2FzSjJXQWtqUT09
Meeting ID: 832 3795 1175; Passcode: AMO95
Bv. ne transdoni la ligilon al aliaj personoj!
**Jen la programo, bv. atenti: tempo estas UTC+1.**

Marija Belošević

**7-a Memorialo "Lucija Borčić": 5-a AMO-Seminario - malfermo: Vortara farado**

**12 nov. 2022 - sabato (UTC+1)**
**-14.00: Komenco de la 95-a AMO-seminario**
**-14.30: Tianyi WANG - Ĉielismo (Ĉinio): Mia vortaro kompilata laŭ la ĉineska lingveco; Minifrazoj el rakontoj far ĉina filozofo Hanfizio (a.K. 280-233)**
**- 15.15: Potturu Ranganayakulu (Barato): Vorto, Frazo kaj la Cerbo**
**- 16.00: Barbara Pietrzak (Pollando): Vortfarado, terminologio, vortaroj en la radia laboro**
**- 17.00: Katalin Kovats (Nederlando): Leksiko de modernaj lerno-aplikaĵoj**
**- 17.45: Ivan Bekavac Basić (Kroatio): Jozo Marević - latinisto kaj vortaristo**
**- 18.10: Tatjana Audeskaja Viktorovna (Ukrainio): Pri ses-lingva ilustrita Biologia vortaro: rusa-latina-Esperanta-angla-germana-hispana"**

**13.nov. 2022 - dimanĉo (UTC+1)**
**- 14.00: Enkonduko kaj Renato Corsetti (Britio): Esperanto sine flexione**
**- 15.00: Rob Moerbek (Nederlando): PIV kaj korektado**
**- 15.45: Alberto García Fumero (Kubo): Vortaro ne nur nia - Esperanto-hispana vortaro**
**- 16.30: Janez Jug (Slovenio): Slovena-Esperanta vortaro**
**- 17.15: Krešimir Belošević (Kroatio): Du kroataj E-vortaristinoj:**
**Danica Bedeković kaj Lucija Borčić**
**Esperanto en la Nacia kaj universitata biblioteko**

**- 18.20: Fermo de la 95-a AMO-seminario**
**- 18.30: Koncerto Ĵomart kaj Nataŝa (Svedio)**

**14 nov. 2022 - lundo (UTC+1)**

**- 18.00: Memore al Lucija Borčić (26.7.1921-14.11.2015)**
**- 18.40: Proklamo de la rezultoj de la Tradukkonkursoj "Lucija Borčić"**
**- 19.20: Koncerto de Maggy Combot *(Reunio)***

# Scienco en la virtuala kongreso

Kiel en la du antaŭaj Virtualaj Kongresoj, en 2020 kaj 2021, ankaŭ en la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK3) okazonta de la 24-a ĝis la 27-a de novembro 2022 kune kun Retoso, la reta evento de TEJO (retoso2022.tejo.org), estos riĉa scienca kaj faka programo. Estos prezentitaj ĉiuj prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj de la Scienca Kafejo (SK) okazintaj en Montrealo (vidu *Esperanto* 2022:9 p. 186-187), iuj eĉ en plibonigitaj versioj, eventuale eblos diskuti kun la prelegantoj kaj fari demandojn realtempe. VK3 provizas senpagan aliĝon por Individuaj Membroj de UEA kaj TEJO, sed nur ĝis la **18-a de novembro**. Eblas aliĝi ĉe: vk.esperanto.net/2022.

Kadre de Retoso kaj VK3, TEJO kunlabore kun ILEI kaj UEA, lanĉas novan konkurson por junaj esploristoj: 'KonSciU', la Konkurso por junaj Sciencistoj kaj Universitatanoj. Ĝi celas individuajn membrojn de TEJO kiuj esploris pri iu fako (ekde la bakalaŭra ĝis la doktora nivelo). Ne necesas esti sciencisto aŭ esploristo laŭ profesio. Oni prezentos dum tri minutoj sian esploron kaj ricevos diplomon kaj eventuale premiojn. La finalo okazos dimanĉon, la 27-an de novembro, je 14:00 UTC. Pliajn detalojn ĉe tejo.org/partoprenu-en-konsciu/. Eblas aliĝi ĝis dimanĉo, **la 20-an de novembro** ĉe: bit.ly/konsciu22.

Reta versio de la IKU-libro de 2022, kun 16 tekstoj de la IKU kaj prelegoj de la Scienca Kafejo de Montrealo kaj pliaj tekstoj kaj resumoj de la Scienca Universitata Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) okazinta dum BET-56 an Litovio, estas nun havebla senpage ĉe iku3.trovu.com. Donacoj bonvenas por subteni la laboron de la eldonisto. Estas aĉetebla la papera versio, ĉe la Libroservo de UEA.

Daŭre estas bonvenaj proponoj de Fakaj Asocioj kiuj deziras prezenti sin dum la Faka Forumo, kadre de VK3. Eblas rezervi ĝis la 22a de novembro ĉe la estrarano pri Scienca kaj Faka agado, amri@huji.ac.il.

## Kursoj en Danlando, Italio

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Pia instruas
Gvidantonomo: Pia Wettergren
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Albertslund, Danlando
Aldoninto: Filuro

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27470

Nomo: Progresinta Kurso de la lingvo Esperanto
Gvidantonomo: Paola Tosato
Tipo: Nova movada kurso

Loko: Padovo, Italio
Aldoninto:  PaolaT

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27469

# Novaj ligoj kun Barato

Kiel jam anoncite, mi prelegos pri Esperanto (pri la ekzamenoj de Itala Instituto de Esperanto) en la 8-a internacia konferenco de Azia Asocio pri Lingvo-Testado (AALA), ĉe Universitato Anna de Chennai, Barato.

Tiu ĉi estas la retejo, kie vi povas trovi ankau la ĝeneralan programon kaj la detalan programon de la prelegoj:. Jen la programojn https://2022aalaindia.com/

Alessandra Madella, ILEI

# Marmotoj meritas mencion

Temas pri rakontoj pri alpaj marmotoj. La legantoj malkovras naturon kaj lernas koni ĝin, respekti ĝin, ami ĝin. Ideala legaĵo por geavoj al siaj nepoj. per la sube aperanta ligilo vi povas mendi ĝin ĉe UEA.

https://katalogo.uea.org/katalogo.php?retrovo=Primault&kondicho=chio&trovu=Trovu+en+la+reta+katalogo

Mireille Grosjean

# Penseo 373 – poezio el la tuta mondo

Jen plia poezio el la fekunda versa fabriko.Ĝuo por poeziaj amantoj!
//alk /EKO Bildoj

# Tigro paŝas en ESF

Alessandra Madella: Sandokan, la Tigro de Mompraĉem

https://esfconnected.org/2022/10/31/sandokan-tigro-momprachem

Fonto: la blogo ESF Connected:

# Plurlingvecon studis la Eŭropa Unio

Mi anoncas la publikigon de nova studo por la Eŭropa Parlamento pri plurlingveco, kiu pozitive mencias Esperanton. Mi mem estas unu el la aŭtoroj de la studo.

Titolo: La aliro de la Eŭropa Unio al plurlingvismo en sia propra komunika politiko.

Resumo: Ĉi tiu studo taksas la aliron de EU al plurlingveco en sia komunika politiko. Noviga aliro de miksaj metodoj estas uzata por esplori kongruecon al multlingvecaj devoj kaj la lingvaj reĝimoj kaj praktikoj de EU-institucioj, organoj kaj agentejoj, precipe en EU-retejoj. La agordo kun la lingvaj kapabloj de EU27-loĝantoj ankaŭ estas esplorita. Politikrekomendoj estas disponigitaj por plibonigi la travideblecon kaj alireblecon de EU-komunika politiko konsiderante limojn derealigeblo.

Aŭtoroj : D-ro Carlos MENDEZ, D-ro Michele GAZZOLA, Prof. Laure CLEMENT-WILZ, D-ro Vasiliki TRIGA, D-ro Fernando MENDEZ, D-ro Costas DJOUVAS, Antonis CHARAMBOULOS, Prof-o John BACHTLER

http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU(2022)699648_EN.pdf

Tiu estas oficiala dokumento publikigita de la Eŭropa Parlamento kiun esperantistoj povas uzi por informado

D-ro Michele Gazzola

## Lampiro – lumo sur la eldona kampo

Brazilo kontribuas al la mondo. Ene troveblas longa artokolo de Ivan Colling, iama estrarano de ILEI. La temo de lia artkolo: 'Instruado de Interlingvistiko kaj Esperanto en filologiaj kursoj de UFPR. (Universitato en Paranao, en Kuritibo.

SMG: Kiel eblas, ke tia bonkvalita eldonaĵo restis ekster lia radaro?

Rigardu ĝin ĉe: https://easp.org.br/lampiro/lampiro_176.pdf

Aristophio Filho

## Rumana kongreso post la pandemio

Inter la 28-a kaj 30-a de oktobro okazis la Tutlanda E-kongreso en Rumanio. Interalie,  la kongreso elektis novan estraron:

Mariana Pitar - prezidanto, kunordigo, uniuversitata agado
Aurora Bute - internaciaj rilatoj
Mihai Trifoi - instruado, rilatoj kun ILEI
Petronela Birta - financoj
Catalin Vaduva.- komunikado.

Okazis ankau – Esperanta agada duontago,  Simpozio, - Eo-kurso, -Konversacia rondo kaj Art-kultura programo.

Aurora Bute., estrarano de UEA.

# Kolektistoj kolektiĝas – jen ENA

Jen alkroĉita la lasta numero de ENA Numismatika Revuo, pri la kolektado de moneroj.

========= vortoj:  920 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25).

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.